



Triesta Esperanto-Asocio



lanĉas
la 4^{an} Internacian Konkurson - jaro 2010
pri la temo:

Kristnaska Poezio

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la **15^a de novembro 2010**, siajn verkojn al la jena adreso:

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Via del Coroneo 15—IT-34133 TRIESTE—Italia

Oni rajtas kontribui pri la supre indikita temo, per unu aŭ pli da faritaĵoj laŭ la kategorio:

Kat. 1) Desegnaĵo (ekz: “kiel mi imagas tiun tradician feston”, “la Kristnaska Kripo”, “familia festo”);

Kat. 2) Rakonto aŭ poeziaĵo, maksimume unu A4-formata folio (ekz: kiamaniere oni festas ĝin familie, pensoj pri tiu kristana festo, pri kristnaskaj tradicioj en propra lando, regiono, urbo; malgranda rakonto aŭ poeziaĵo pri kripo, pri la naskiĝo de Jesuo, kristnaska fabelo, ...);

Kat. 3) Manfaritaĵo (el gipso, ligno, metalo aŭ papero, aŭ el iu ajn alia materialo).

La ĵurio atribuos al **Kat. 2)** aldonajn 5 poentojn por favori la partoprenon en tiu ĉi branĉo.

La “rakonto” aŭ “poeziaĵo” estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro, kaj ĉiuj aliaj faritaĵoj estu akompanataj de frazo aŭ komentario en ambaŭ lingvoj.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj:

- * persona kaj familia nomoj;
- * aĝo;
- * lernejo kaj klaso;
- * poŝta adreso.

Se eblas, bonvolu aldoni malgrandan foton de la aŭtoro.

Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2010.

La vizitontoj donos poentojn al la plej bela verko el la tri kategorioj, kaj tiuj ĉi aldoniĝos al la poentoj de la ĵurio.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj [A]; de 9 ĝis 11 jaroj [B]; de 12 ĝis 14 jaroj [C]) enkadre de publika ceremonio en Trieste.

Por kromaj detaloj/informoj: noredv@tele2.it aŭ testudo.ts@gmail.it